

Rudolf Baumbach,
En la glaso ne guto plu

tradukita de Manfredo Ratislavo

1 Estas eĉ ne plu guto en
mia glas', la monujo sen
mono; estas la fino.
Ebriigis ja la vin',
kaj rigardo via min,
ho gastejo-mastrino!

2 "Je kredit' ne povas mi
doni vinon plu al vi,"
diras ŝi ridante.
„Povas por la garanti'
vian sakon doni vi,
restu plu trinkante!“

3 Interŝanĝas tiun ĉi
sakon kontraŭ vino li,
volas survojigi
sin, sed diras la mastrin':
„Lasu, juna ulo, vin
garantiaĵigi!“

4 Donas por la garanti'
ĉiujn siajn aĵojn li
kontraŭ dolĉa vino;
affiktite volis sin
turni for de la mastrin',
la belega ino.

...

5 Diras tiam tiu ĉi
bela ino: „Donu vi
koron al mi vian!“
- Mi sciigas nun al vi,
ke sur sia buŝo ŝi
sentis jen alian.

6 Verkis tiun kanton ĉi
en somera nokto mi,
gaje ĝin kantanta.
Sidis antaŭ glas' da vin
mi sur benk' kun la mastrin'
sub tilio floranta.

*Traduko de la Germana poemo “Keinen Tropfen im Becher mehr” de RUDOLF BAUMBACH (*1840 – †1905) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-10.*

MR-408-1a / Arg-68-133 (2003-11-21 15:58:39)